

Boulogne sur Mer
31, Boulevard Mariette
la 22^{an} Junio 1925

1

Kara Amiko

Vi sendube estas tre kontenta ĉar mi prokrastis mian respondon al via ŝatinda letero de la 10^a de Aprilo, ĉu ne? ĉar tiel maniere², vi ne sentis ke vi ŝuldis, de nove, respondon al mi.

Mi ne skribis de tiel longe al vi, sed mi neniam pripensis tiel forte + ofte al vi, ĉar mi, ĉiu tage, diris ke mi skribos + vespere estis malkontenta ĉar mi ne plenumis mian intencon.

Mi ricevis vian leteron en Anglujo, dum la Paskaj libertempoj, Ni pasigis tre agrablan tempon sed terure malvarman pro ventegoj. Kompreneble, mi malvarmumiĝis en tiuj malbone hejtigitaj anglaj domoj + eĉ ankoraŭ nun, ne estas tute kuracita, kvankam alimaniere, mi estas tre sana. Mi ludas tenison ĉiutage + golfon, dimanĉon.

Kaj via ŝakludo? Ĉu ĝi ĉiam entuziasmigas vin? Mi ankaŭ ludas, sed neniam, mi trovas sufiĉe da tempo por ludi, unu horon, 2 horojn! Estas tro por ludo kiu ne okazas ekstere en freŝa aero!

Via letero tiel plezurigas min, vi ne povas imagi! Tim da entuziasmaj korespondantoj iom post iom ĉesas. France oni diras: "Les vieux amis sont les meilleurs"³. Jen pli ol 5 jarojn vi korespondas kun mi, nun, ĉu ne?

Ĉu vi intencas iri Ĝenevon? Ĉu vi, kiel D^{ro} Leono Zamenhof, kiel D^{ro} Broder, skribos "Ne, mi ne iros". Estus vere bedaŭrinde. Svisujo estas tiel bela. Mi timas ke pro alta monŝanĝo ne multaj ĉeestos la Kongreson. La Kongreso estos despli agrabla. (sed ne bona por la propagando).

Mi ne prenis ankoraŭ miajn aliĝilojn. Mi petis, antaŭ unu monato, mian edzon skribi por mendi ilin, sed ... kiel vi, li estas tiel okupita ke li prokrastas + prokrastas. Sed, tamen, malgraŭ ĉio, mi esperas partopreni la 17^{an}.

Mi korespondas kun Hungarano kiu ankaŭ intencas ĉeesti. Krom vi + li, mi ne renkontos aliajn korespondantojn. Cetere, oni povas diri ke mi preskaŭ ne plu havas korespondantojn (krom mia fidela Meksikano). Kiel la homoj laciĝas facile! Kiel ili ŝatas novajn impresojn!

Antaŭ 2 semajnoj mi pasigis unu semajnon en Parizo + vizitis la Ekspozicion de belaj Artoj de Dekoracio. Ĝi estas mirinde bela, precipe vespere, kiam la akvofaloj tiel luksaj estas tute lumigitaj. Neniam la homa menso povus imagi ion tiel artan, tiel ensorĉantan. Estas vera fantasmagorio, vera mirindaĵo. Des pli ke kiam ni ĉeestis, la vetero estis belega + la ĉielo bluega + hela kiel dum la noktoj en Venecio. La Seine (riverego) estis tiel kiel ke mi ne povus trovi vortojn por klarigi al vi mian artan impreson. Dum la tago, la vetero estis tropike varma, kiel ... en Praha. Sed mi ne ofte iris piede + prenis taksiojn - precipe por trapasi longajn varmajn punktojn⁴ ... kiel en Praha.

Mi ĉagreniĝis en Parizo pro tio ke mi estus ŝatinta ke miaj fremdaj amikoj ne povus vidi⁵ tion kion mi vidis. Ĉu vi ne povas viziti Parizon + ĝian ekspozicion⁶? Se vi povus, ne forgesu ke 31 B^d Mariette atendus vin kun malfermitaj brakoj. Estas nur 2h 1/2 de Parizo. Sed ne venu dum Aŭgusto, ĉar ni ne

¹ manuskribita noto: doŝlo 25/6 1925

² ĉu nur "tiel" aŭ "tiamaniere"?

³ "Malnovaj amikoj estas la plej bonaj"

⁴ ? ĉu "punktojn" ?

⁵ ĉu "ke miaj fremdaj amikoj ne povus vidi ..." ?

⁶ ekspozicion

ĉeestus. Kiel mia edzo + mi estos kontentaj, kiam vi skribos "Mi venos". Eble, tiu tago alvenos, kial ne?

Mia edzo ĉeestis en Parizo, la Kongreson de la "Bâtonniers de avocats de France" sekvita de festeno. Ili tion tiel bone aranĝis + Lucien tiel bone parolis ke nun, la advokatoj de 60 jaroj, se ili ne plu pledas, ricevos renton de almenaŭ 4 000 frankoj po jaro. Estas bona afero, ĉu ne, por la maljunuloj.

Kiel mi dankas vin por via kortuŝanta lasta letero! Vi ne skribas ofte + antaŭ kelkaj monatoj vi anoncis ke vi ne plu skribos - ke estos finite, sen tamen tiu letero kompensas por la manko de la aliaj.

Estas vera ruzo de advokato, anonci ke oni tute ne plu povas korespondadi + de tempo al tempo sendi ĉarman neatenditan leteron, kiu eble pli plezurigas ol se oni ĉiam skribas. Ĉu ne ? estimata advokato ?

Mia filo studas multe por plenumi post 2 semajnoj, sian 1^{an} ekzamenon de Doktoro en leĝoscienco = "Le droit romain" - "Sciences juridiques". Estas la plej malfacila ĉar ne estas eble rezoni per intelekto, sed estas afero "per kere"⁷. Kaj, malfeliĉe, li perdis pli ol 2 monatojn pro febro skarlateno, k.t.p.

Antaŭ kelkaj tagoj, la religia procesio kun episkopo, k.t.p. okazis B^{do} Mariette. Ĝi estis tre bela pro la arbara verda kvadro, + la alta altaro meze de arboj estis ankaŭ bela. Sed, mi koleras vidante tiom da personoj kiuj povas kredi ... ĉion kion oni lernigas en la R.Kat. religio.

Nun, kara korespondinto + ebla estonta kongresano, mi adiaŭas vin, ĝis kiom da semajnoj, da monatoj?

Saluton tute amikan al via Edzino. Kison al via Eveto kiu devas esti vere ĉarma en sia nunagô.

Vere Samideanan manpremon al mia ekskorespondanto

Alice Sergeant

Amikan penson de mia edzo.

⁷ ĉu "parkere" ?